CNT AIT FAI
INTERNACIA LABORIST-ASOCIO
# INFORMA BULTENO
NACIA KONFEDERACIO DE L'LABORO
IBERIA ANARKISTA FEDERACIO
Adreso: ESPERANTO-FAKO • Av. Durruti, 32 k 34
BÁRCELONO (Hispanio)
IIa Jaro | 25 Julio 1937 | Numero 2

**NACIA KONFEDERACIO DE LA LABORO (C. N. T.)**

## Tutmonda proletaro, nia 12 monata rezistado meritas la intensigon de via solidareco!

Kamaradoj, laboristoj, proletaro el la tuta mondo! Hodiaŭ pleniĝas unu jaro ekde la faŝista leviĝo en Hispanio. La internacia faŝismo en sia aspiro konkeri poziciojn, superregi la mondon, financis la artifikaĵon de la ribeliĝo, realigita de la kapitalismo, la eklezio kaj la militarismo.

Oni kredis, ke estus facile subpremi la ribeleman popolon. Sed la intenco estis akompanita de la frakaso plej bruega. La popolo, la hispana proletaro kun malmultaj armiloj kaj multe da kuraĝo ĵetis sin al la batalo kaj premis en la pli gravaj urboj la perfidulojn, la troriĉan kaston, kiu volis nin subjugigi.

La duono el Hispanio restis en la manoj de la reakcio, k kun la senkondiĉa apogo de la internacia faŝismo, kun miloj da maŭroj, germanoj kaj italoj, kun la helpo de la germana Armeo, kun abunda militmaterialo, la perfiduloj entreprenis la konkeron de la cetera duono el Hispanio, kiun la proletaro tenis en sia povo.

Ni batalis kiel ni povis. Ni improvizis armeon kaj devis batali kun manko de materialo. K malgraŭ ĉiuj malfacilaĵoj, malgraŭ ĉiuj improvizaĵoj, ni estis kapablaj haltigi la antaŭeniradon de la armeoj, superaj en organizado k batalsperteco. Sed nun, ĉe la finiĝo de unu jaro, ni disponas florantan armeon. K ni sekvas antaŭen en nia batalo kun rideto, certaj trafi la venkon, per la prezo de sennombraj oferoj kaj miloj da falintoj.

Unu jaro en kies daŭro, dum la faŝistaj imperioj apogadis senhonte Frankon, la demokratioj, sekvante malpuran vojon, malkoncernigis sin per la "neinterveno" unue. kaj la "kontrolado" poste prezentis rektan apogon al la faŝistoj. Unu jaro, dum kiu, volante eviti la militon, oni ĝin favoris, permesante al la faŝismo plibonigi siajn poziciojn.

Nun ŝajnas elŝpruĉi movado pri helpo, pri pliĝustigo de la konduto flanke de iuj demokratioj. Sed ni ne tre konfidas al ĝi. Ni ja estas konvinkitaj, ke oni projektas ion kontraŭ hispana popolo, kontraŭ la revolucia popolo.

Pensu, kamaradoj, ke nia celo estas la via. Ke se en Hispanio triumfas la faŝismo, senprokraste ĝi eksuperregos en Francio. Germanio satigos sian malamon, kiun sentas pri Francio, kiu ĝin venkis en 1918. Italio defiitive aneksus al sia naskiĝanta imperio Aŭstrion kaj Hungarion. Germanio falus poste super Ĉeĥoslovakio. Japanio atakos Rusion. K la mondo restus balbaŭ submetita sub la fer a kalkanumo de la internacia faŝismo.

Por ni, la hispanaj revoluciuloj, ekzistas nur unu savo: via apogo. Ĝi estas la unika efektivo. La uniko, kiu ne malprosperigas. La uniko, kiu utilos celkonforme.

Ne malsukcesigu nin. Pensu pri la tragedio, kiu superflugos nin kaj vin. Faru ĉion eblan por helpi nin por venki. Venkante ĉi-tie malfermiĝos maro da ebloj favore al via libero.

Ni konfidas, ke vi scios plenumi vian devon. Ni ne petas de vi homojn. Al ni ne estas necesega via ĉeesto en la batalo. Ni kiel batalantoj sufiĉas por venki. gardu viajn homre zervojn por la konkeroj de la tutmonda proletaro. Povas prezentiĝi akraj bataloj en diversaj nacioj, k vi devas esti tie por defendi nin k vin. Kion ni petas, tutmonda proletaro, estas armiloj por Hispanio lojala, revolucia.

Helpu la hispanan antifaŝismon!

Bojkotoń al ĉiuj faŝistaj komercaĵoj!

Monon por nia celo!

Vivu la agadunueco de la tutmonda proletaro!

Ĉi-tiu estas nia parolo en ĉi unujara datreveno sanga, sed ĝoja!

La 18 de Julio de 1937!

la NACIA KOMITATO DE C. N. T.

# La diskursoj de niaj kamaradoj Oliver k Montseny en Parizo

Parizo.—Sur la placo Iver antaŭ pli ol 10 miloj da parizanoj la kamaradoj Garcia Oliver k Federika Montseny, pretaj ĉiam subteni latente anarkistan senton, donis mitingon grandgravecan, ŝuldata al la tragikaj horoj, kiujn travivas la hispana proletaro.

La kamarado Oliver komencis sian diskurson, parolante france k saludante je la nomo de la Anarkismo la ĉeestantaron, transkuras raporti pri la historiaj faktoj, kiel determinantoj de la hispana milito. "En 1911 k poste en 1917, diris la oratoro, komencas enkorpiĝi la anarkistaj ideoj en Hispanio, k ekde tiu dato komencas la kruela persekutado kontraŭ ni, la homoj de F. A. I., perdante en tiuj tempoj sangoverŝaj la plej bonajn batalantojn. Poste alvenis perforte la diktatoreco k portante en sia sino kiel ĉiuj diktatorecoj, la ĝermon de la detruemo, venis pro impulso sponta k popola la Respubliko por anstataŭi la tiranian reĝimon. Kion faris la Respubliko? La hispana Respubliko neniam aspiris krei grandan partion plimultan, kiun sentus la demokratio k dezirus akceli la socialan evoluon k unike la laboristaj organizaĵoj C. N. T. k U. G. T., kiuj estis vipitaj de la malsato k mizero, grupigis 90 porcentojn el la hispanaj proletoj, sufiĉe trompitaj de la respublikaj promesoj.

En 1936 ni ne diris al la kamaradoj iri voĉdoni, sed oh! ni diris al ili esti pretaj defendi sin sur la stratoj per armilo en la mano, se la reakcio realigos perforton. La lasta okazis k en Katalunio dum kelkaj horoj oni piedpremis la faŝismon, k la samo okazis en Valencio, en Madrido k en multaj aliaj urboj. K nun mi diras al vi laboristoj el Parizo, el tuta mondo: la faŝismo estas malkuraĝa, vi ne timu ĝin, kiam vi havas ĝin sur la stratoj, pretigu vin doni renkonton al ĝi, kiel ni faris en Hispanio k vi vidos ĝin venkita, kiel ni vidis ĝin en Katalunio."

Li raportis pri la tagoj de la fremdlandanoj, kiuj iris al Hispanio por ekspluatadi ĝiajn riĉaĵojn per la samaj procedoj kvazaŭ ĝi estus kolonio, k nome kontraŭ tio k kontraŭ la tiranio la hispana popolo batalas aktuale. "Ni, la homoj de C. N. T. k F. A. I., daŭrigis la oratoro, havis en niaj manoj la Povon, ĉar la Povo estis sur la stratoj; ĉe la barikadoj, en la plumulto, kiu batalis, estis niaj kamaradoj, sed ni ne volis altrudi nin perforte, ĉar ni ja ekzercus diktatorecon, kiun ni ĉiam malamegis k ni preferis kunvivi lojale kun ĉiuj antifaŝistaj sektoroj, k tia konduto oni alnomis ambicia k sekteca. Kiuj estis la unuaj, kiuj direktis sin al la aragona fronto, se ne Durruti, Jover, Ortiz k aliaj konfederacianoj?

Ni ne vidis nin helpitaj de la internacia proletaro, estante komuna la problemo solvota, ĉar ni batalas por Hispanio, sed ankaŭ estas por la tutmonda proletaro. Do pro kio manko de efektiva helpo en armiloj, municioj de la ĉiulandaj laboristoj? Elĉerpante la blankan pulvon, ni ne havis alian rimedon ol utiligi la nigran pulvon, kiu dum malmultaj pafoj krevigas la fusilon kun certa danĝero por la kamarado, kiu ĝin tenas. K la kamaradoj ĉe la fronto diris al mi, ke se mi sendos al ili pli da nigra pulvo, ili min mortpafos k mi diris al ili, ke ili devas pafi per la nigra pulvo, ĉar de la blanka ne plu estas. K kiam la nigra elĉerpiĝos, vi devas pafi per ŝtonoj, per kio ajn antaŭ ol konsenti, ke la malamiko antaŭeniru unu paŝon. Nu vi aŭdas, laboristoj el Parizo k tutmondo, pro manko de solidareco, per kiaj elementoj ni batalis en Hispanio kontraŭ la supermodernaj militaj armiloj, kiujn posedas la faŝismo. Tiel klariĝas la cedoj de niaj kamaradoj ĉe iuj batalfrontoj. Helpu, helpu viajn hispanajn fratojn, kiuj tiel grandanime oferas sian sangon, por ke venu tago, en kiu la homaro, t. e. la proletaro senmisfitike ne vivu en eterna suferado."

La kamaradino Federika Montseny parolis ankaŭ france k inter la aliaj interesaj aferoj, diris: "Se en Hispanio pro la interkonsento de la internacia faŝismo sukcesos triumfi la faŝismo, sciu francaj laboristoj, ke Francio estos ankaŭ viktimo de tiu timiga monstro. Ne povante oponi al ĝi la saman kvaliton de la armilaro, kvankam kun supereco en braveco k konvinko, ni batalas en Hispanio ne kontraŭ Franko, sed kontraŭ la faŝismo itala-germana-portugala, t. e. kontraŭ internacia faŝismo. Do pro kio la bojkoto flanke de la demokratiecaj landoj kontraŭ la akiro de armiloj por la hispana registaro, maksimume kiam nia batalo estas legitime populara k kun demokratieca enhavo?

Ni volas la unuiĝon por finigi la faŝismon k tio estas senia dubo profito por la tutmonda proletaro. Estas necesege, ke la laboristoj el ĉiuj landoj faru kion jam faris la hispanaj por finigi foje la tiranion. La ekzemplon jam donis Hispanio k konsideru nian venkon sekura, se la solidareco ne estas mito, k armiloj k municioj ne mankas al ni, ĉar bona pruvo pri tio ja estas la frakaso de la italoj en Guadalajara."

La kamaradino Federika Montseny finis, dirante, ke la faŝismo estas la milito k kontraŭ la milito k kontraŭ la faŝismo ĝuste ni batalas nun en Hispanio.

# Antaŭen!

Antaŭen!
Antaŭen!
hispanaj antifaŝistoj.
Per supera streĉo
por ĉiam vi abolu
la fian faŝismon,
kiu nutras sin per karnaĵo
de viaj fratoj k fratinoj.
La kapitalistaro internacia,
la burĝaro k la eklezio
militas kontraŭ vi.
barbarece k furie.
Hitler k Musolini,
malsatigeblaj sangosuĉantoj,
al via lando
senlace sendadas
trupojn,
aeroplanojn,
tankojn,
venengasojn
por dezertigi vandale
viajn fekundajn kampojn,
por detrui, ruinigi
viajn florantajn urbojn
k primitivajn kabanojn,
por masakri k senvivigi
virinojn k infanojn.
Sed vi, antifaŝistoj,
streĉu superajn fortojn
k per fera piedo tretu
la kapon de la faŝista besto.
La proletaro tutmonda,
solidariĝante k helpante,
rigardas vin reve k esperas,
ho idoj de la Libero.
Antaŭen!
Antaŭen!
bravege k aŭdace,
hispanaj antifaŝistoj.
Per epokfara gesto
starigu tra la tuta mondo
liberon k justecon.

PARIO

# 19 Julio 1936

Okaze de la 19 de Julio la Regiona Komitato de C. N. T. k F. A. I. diskonigis tre vastan manifeston, el kiu ni ekstraktas la jenon.

La 19an de Julio 1936 C. N. T. senartifike plenumis sian devon. Ĝiaj batalantoj kun pistoloj k alispecaj armiloj, kiujn ili savis el la persekutadoj de la regantoj de 1931, nigraj k blankaj, ĵetis sin surstraten. Ties brustoj estis elmetitaj kiel bariero malforigebla al la perfidaj militistoj, embuskitaj pastroj k avara kapitalismo.

Tagojn antaŭe tamen C. N. T. en ĉiuj provincaj ĉefurboj proksimiĝis al la regantoj de la maldekstreco, petis de ili armilojn, per kiuj disbati la maskantan sin perfidon. La regantoj rifuzis. Ili havis la ribeliĝon, sed ili ankoraŭ havis la anarkistojn. Per si mem tio estis sufiĉa motivo, ke ni lasu ilin solaj, sed respondecaj pri niaj agoj, ni eliris surstraten. Ni ja havis konsideron pri la eksterordinara graveco de la faŝista triumfo en Hispanio. Ĝuste pro tio, kiam "Frente Popular" (Popola Fronto) petis la popolon voĉdoni, C. N. T. diris: "Ne gravas, ĉu ni voĉdonos aŭ ne voĉdonos. Voĉdonante aŭ ne voĉdonante, se vi volas kontraŭmeti vin al la faŝismo, al la reakcio,, vi devas eliris surstraten k gajni la batalon ĉe la barikadoj. Unu fojon pli C. N. T. demonstris sian ĝustan vidpunkton. K kiam la ribeliĝo efektiviĝis ĉie respondis niaj batalantoj. K kie triumfis la faŝismo, estis pro kulpo de la regantoj— tion ili trokare pagis—kiuj en sia timo de C.N. T. viva popola enkorpiĝo, ne donis al ĝi faciligojn por kontraŭstari al la atako de la faŝismo. K pro tio brava Saragoso, konfederacia Saragoso estis superregita de la faŝistoj-perfiduloj. Pro la senkapableco de la aŭtoritatuloj nefaŝistoj. K tiel falis Galicio k parto el Andaluzio k Malnova Kastilio. Pri tio havis kulpon nek la anarkismo, nek C. N. T. Ties batalantoj donis sian vivon, batalante en senpoveco...

La 19an de Julio 1936 neniu demandis la kamaradon ĉe la barikado al kiu partio apartenis, kiel opiniis, kion deziris. Ĉiu ja sciis ĝin: bati la faŝismon, konkeri ĝiajn poziciojn. Nur tio. Poste, baritaj la perfiduloj, venus la cetero...

K la unueco estis efektivigita. Ĝin sanktigis la vundoj k la sango. La dolorkrioj de la vunditoj k la ĝojeco de kiuj konkeris pozicio al la malamiko aŭ krevigis kontraŭlon.

Belegan estonton inaŭguris al la proletaro la tagoj de Julio 1936...

Finiĝis en la urboj la batalado. La popolo venkis. Organiziĝis la unuaj kolonoj entuziasmaj, ĝojplenaj kun senlima fido pri la triumfo eliris serĉi la malamikon...

Pasis monatoj. La milito plilongiĝis. La indeferenteco ĉe kelkiuj. La prozelita aspiro ĉe aliuj. La dubinduloj, kiuj akiris konfidon k aperis sur la kampo de la sociala vivo, spekulaciante, forrabante k riĉiĝante malprofite al la popola forto. La senhonoruloj, kiuj aperis por kolekti sian forprenaĵon, k sin kaŝis dum la popolo estis batalanta. La ĉiamaj eŭnukoj. La oportunemuloj iniciatis sian interrompitan intrigadon...

K tiel la unueco, sanktigita perla sangaro de 19 de Julio estis dissolvita...

Sed C. N. T. plenumis sian devon. Ni eliris surstraten, kunlaborante, intense k definitive al la batalado. Ni donis la floraron el nia batalantaro. K C. N. T. organizis senprokraste la produktadon. Funkciigis la fabrikejojn, forlasitajn de la faŝistoj. K ni malebligis, ke la politikistoj regu la landon, kiam per ioma forto ni deflankigis ilin kiel mastrojn de la socion. Kiu ja povis kontraŭstari al nia potenco disvolviĝanta k superreganta.

Pasis kelkaj monatoj. Ni vidis, ke la politikistoj ne estis kapablaj orienti la popolon al la venko k en Septembro C. N. T. akordis intervenon pri la direktado de la milito... Ni oferis ĉion antaŭ la oferejo de la kulmina intereso gajni la militon...

K fine kiam la aferoj marŝis malbone, oni donis al ni partoprenon en la registaro. Estis en Novembro.

Sesmonata militdirektado. Agado pura k honesta. Dura k maltrankvila kaŭze de la manovroj k intrigoj de la financa banditaro. K estis tiu registaro, kiu organizis la Popolarmeon. Estis kiu donis konfidon al la popolo ĝis la momentoj de la plej granda danĝero, en la plej duraj okazoj. Estis tiu registaro, kiu prizorgis tion, kion permesis al la laboristoj la opozicioj k la interesoj de la bastardoj, ke la produktejoj ne restu paralizitaj. Estis kiu organizis la evakuadon. Estis kiu iniciatis reformon pri la jurkodo. Estis ĝi, kiu donis egalecon de la rajtoj k devoj al la virino kun la viro. Estis fine kiu faris kion povis k kion permesis la cirkonstancoj...

Unu jaro de dura eksperimentado povas estis pli ol sufiĉa, por ke ĉiuj rektigu agadojn k poziciojn. T. e. ke sen intima unueco, sen formala kunlaboro k honesta lojaleco ne estas eble atingi venkon k malpli akiri ĝin per la necesa rapideco.

K ĉi kunlaboro, ĉi unueco devas fundamentiĝi sur du principoj:

I. Rekoni implice, ke 19 de Julio estas efektiva transformiĝo de la enlanda socia k ekonomia k politika strukturo.

2. Ke la popolo ne batalas nur por bati la faŝismon, sed ankaŭ plibonigi sian situacion en la ekonomia vivo k pri sia sendependo.

Deduktante el ĉi neoblikvigeblaj principoj, estas fundamentenda la unueco de ĉiuj antifaŝistaj sektoroj. Por gajni la militon. Por rekonstrui la kadukan ekonomion.

Al tio ni devas iri senprokraste, senrezerve. K kune kun la antifaŝista unueco, la alianco de la sindikatoj.

Tio estas la konkludoj, kiujn ne forlasas C. N. T. Pri kiuj ĝi levas flagon. Por kiuj ĝi laboras intense k disponigas ĉion.

K ĉiu rekonu tion k faru ĝin. Oni ni ripetigu al ni la embarasigan ekeston de "Frente Popular". Ĝi estis utila, havis sian epokon. Sed estis superita. Ni nur rememorigu pri la 19 de Julio 1936. Kion estus farinta "Frente Popular" (Popola Fronto) per si mem? Ĉiu demandu vin honeste: Ĉu oni estas venkintaj kie ajn sen C. N. T., sed U. G. T., sen F. A. I.? La lastaj estis kiuj donis k kiuj batis la malamikon...

La popolo prijuĝu k alpremi tiujn, kiuj kontraŭas al la rapida unueciĝo antifaŝista.

Ni manifestas nian malprofaneblan deziron atingi ĝin.
Vivu la antifaŝista fronto!
Vivu la alianco C. N. T.-U. G. T.!
Ekviglu, popolo! Sur postenon, proletaro!
Por la venko!

*Nacia Komitato de C. N. T.*

# Bilanco pri la 12 monata milito

Ni jam enpaŝas la 12 monaton ekde la leviĝo de la hispana militistaro. Sufokite dum malmultaj tagoj la ribela movado fariĝis civila milito. Kelkajn monatojn poste la tragedia batalo, kiu sangigas la iberian teritorion, transformiĝis en internacian militon. Dum la lastaj monatoj germanoj k italoj penadis kaŝi antaŭ la mondo la veron pri sia rekta interveno en la hispana milito. Sed la nedelongaj deklaroj de unu teŭtona milita aŭtoritatulo okaze de la enterigo de la viktimoj de "Deutschland", k la artikolo publikigita de "Duce" en unu roma gezeto reprezentas oficialan deklaron de ambaŭ registaroj, kiu konfirmas la rektan intervenon de la samaj ŝtatoj en la hispana batalo.

Dum multaj monatoj jam la registaro de la hispana respubliko povis demonstri al la mondo la invadon de sia territorio flanke de la regulaj armeoj de Germanio k Italio. El datoj prenitaj al la malamiko oni venis al la ekkono, ke la dungitaj fortoj, kiuj militas ĉe la flanko de la ribeluloj, diskomponas jene:

| | |
|---|---|
| soldatoj italaj . . . . . . . . . . . . . | 102000 |
| soldatoj germanaj . . . . . . . . . . . | 87000 |
| soldatoj maŭraj . . . . . . . . . . . . | 60000 |
| soldatoj afrikano-abisenaj . . . . . . . | 29000 |
| soldatoj irlandaj, polaj k de aliaj nacieoj . . . . . . . . . . . . . . . | 31000 |

La homoj oferitaj al ĉi batalo sovaĝa k pasia ne povas esti kalkulataj kun ekzakteco en ĉi momentoj. Se bone konsideriĝas la oficialaj statistikoj de ambaŭ militantaj flankoj k la informoj, kiujn al ni disponigas la Internacia Ruĝa Kruco, la cifero de la homperdoj superas 300000.

Estas kuraĝe konstati, ke la ribelintoj imponis rapide sian hegemonion en la agrikulturaj zonoj pli submetiĝemaj al la loka tiranio, t. e. en tiuj lokoj, en kiuj la loĝantaro sekvis la direktricojn de la estroj. K en la industriaj zonoj —Baskio, Valencio, Katalunio, orienta Andaluzio ktp. la militista movado estis sufokita rapide.

La ekonomia fakto intervenas laŭ tre peza formo en la primitiva rezulto de la batalo. Zonoj integre agraraj elmetitaj al multtaga malsato, sen sindikala unueco k kun nesufiĉa ekonamia potenco falis rapide sub la faŝistan boton. Industriaj zonoj aŭ kun fortika ekonomia bazo, kun forta sindikala organizo k en kiuj la propreco estis bone disdividita, ekzistas ekonomia sendependo, kiu permesas agi libere en la publika vivo, la faŝistoj estas detruitaj k premitaj repide.

Kia estas la ekonomia bilanco de ĉi 12 monata milito Kioma estas tradukita en mono la perdaro kaŭzita al la hispana nacio en ĝiaj terkulturo, minaro k industrio? Ĉu estas eble tradukti en ciferojn kiomon la hispana popolo estas perdinta ĝis nun koncerne al ĝia arteca, intelekta k scienca trezoro?

Ĉi bilanco estas reale drasta. Kvankam ĝia komplekseco mi prizorgos koncizigi ĝin en kelkajn anoncojn k klopodos reflekti en kelkaj ciferoj ĝian egan volumenon. Eble observante k meditante super tio, la konscienco de pluraj leviĝos k kontraŭagos antaŭ la scenaĵo, kiun la mallojaleco de kelkaj uloj produktis en nia lando.

Dum la invadado de Abisenio flanke de Italio granda numero da neŭtralaj landoj, inter ili ankaŭ la nia, utiliĝis la provizoran foriron de la italoj el la determitaj merkatoj por okupi poziciojn k por asekuri al si eliron por siaj komercaĵoj.

K hodiaŭ, kiam Hispanio troviĝas en sama okazo k kiu estas ŝuldata al la ekonomifinanca ofensivo, kiun la internacia kapitalistaro entepreni kontraŭ nia lando, sekve al la rigora blokado, kiun ni suferas rilate al niaj marbordoj k landlimoj, nia import-k eksport.komercoj restis praktike nuligitaj.

Ankaŭ ne estas determineblaj en ekzaktaj ciferoj la perdoj, kiujn suferis Hispanio pro la elartikiĝo de sia eksterlanda komerco. Al mi ne estas eble diri ĝuste la ekzaktan volumenon de tiuj komercaĵoj, kiuj antaŭ 19 de Julio eliris kun vojo al la determinitaj eksterlandaj merkatoj k kiujn nun ni ne povas eksporti.

Vastaj sektoroj de nia industrio faligis vertikale siajn merkatajn operaciojn. En kelkaj el ili la perdo atingis 80 procentojn koncerne la eksporton k en la ceteraj la paralizo estas integra.

Sekve de la reĝimo de "monhelpo", per kiu vivas 3 kvaronoj el la industriaj laboristoj, estiĝis konflikto kun eksterordinara graveco, sekve de la momenta perdo de 3 kvaronoj de la interna konsummerkato, pro tio ke ĝi troviĝas en faŝista povo, altrudiĝas al Hispanio alia problemo.

K la vegetaĵa produktado de la hispana popolo troviĝas en grava malsufiĉo. Oni ja scias, ke la grandaj produktadzonoj de tritiko estas en la manoj de la faŝistoj, k pro la milito ni povis savi nur tiun tritikrikolton en Do estas nedubeble, ke se estos relative pano en la lando, kelkaj kastiliaj provincoj, kiuj ne estas en la milita sektoro. ŝuldos al la akumulitaj ekzistoj en la grenujoj de la antaŭaj rikoltoj, t. e. la pano, kiun ni manĝos en Hispanio, akiriĝos el la multnombraj kvantoj, kiuj ekzistis antaŭe 19 de Julio.

La nacia rentumo malpliiĝas laŭ timiga proporcio. Ĉirkaŭ miliono da homo estas rekrutitaj en la pormilitaj formacioj. Aliaj kelkaj milionoj dediĉas siajn aktivecojn al la akirado de militmaterialo, ne kalkulante krome la aliajn grandajn kontigentojn da urbanoj, sin dediĉantajn al fortikigado.

La amplekso de la pritraktataj problemoj rilate al la bilanco de 12 monato milito devigas nin lasi por alia artikolo la finon de ĉi pristudo. Ĉiuokaze ĉi konciza antaŭparolo permesos al ni akiri ekkonon super la amplekseco de ĉi katastrofa scenaĵo de la militista leviĝo ĝis nun.

Fininte la militon Hispanio estos amaso da ruinoj k restos kun sia forkonsumita ekonomio. Ĉi katastrofo implikos la sorton de kelkaj generacioj, la neniigon de nacio, la detruadon de ekonomio k eble la perdon de multaj perspektivoj por unu historia estonto.

J. P. FABREGAS

prezidanto de la scienca instituto en Katalunio

# Pri la falo de Bilbao

Unu faŝista radio dissendis sciigon rilate la evakuadon de Bilbao de la heroaj defendantoj. La sciigo entenas ankaŭ ĉi frazon: Venka glavo de lia imperiestra moŝto Franko".

"Venka glavo imperiestra! De kiu imperio? De kiu venko? En Baskio operaciis unuflanke kun multmiloj da italoj, germanoj, legionanoj k maŭroj 200 aeroplanoj de Hitler k centoj da kanonoj, senditaj de Germanio k funkciigataj de germanaj teknikistoj k aliflanke nemultenombraj bravaj milicanoj, laboristoj, fiŝkaptistoj k kamparanaroj, kiuj sen vivrimedoj, sen bazoj de rezistado, izolitaj inter maro k montaro, reduktitaj al unusola forto, defendis sian teron ŝultro ĉe ŝultro dum 80 tagoj, mirigante la mondon k enskribante en la historion paĝon nevelkigeblan.

En la senordo dum la unuaj tagoj de la ribelo restis en la Nordo disigitaj de la antifaŝista bloko kelkaj centroj sindonaj al la respublikana reĝimo. De Gijon al Irun laŭlonge de la marbordo. Tiu-ĉi parto povis disponi nur la resulton de sia defensiva k ofensiva forto. Karlista Navarra premadis ĝin treege Kastilo, superregata de la ribelintoj fermis la vojojn al Sudo. La nordokcidenta gallego sendis kontraŭ ĝi siajn kolonojn el miksitaj rekrutoj, plifortigitaj poste pro ties militneefiko per afrikanaj trupoj.

Irun falis pro manko de municioj. San Sebástian pro la sama kaŭzo. La baskoj entranĉeigis sin en la montaroj k la valoj k kuraĝis malsupreniri al la ebenaĵoj, dum la santanderanoj invadis Burgos 'on k la asturanoj, ĉirkaŭante Arondam k Oviedon, ne timis entrepreni militiradojn al la provinco Leon. Plie venis la tago, kiam la ribeintoj suferis frakason en Madrido, konfidante al la itala armeo la herkulan taskon malfermi al ili la vojon al Valencio. K tiu invadanta armeo estis venkita en Alkario inter la ridegoj de Eŭropo...

Oni devis forigi la malagrablan impreson, fabriki sukceson, sekurigi triumfon. La falo de Malago ne estis pli ol epizodo. Kie oni serĉis la bruegan revenĝon, kapablan sonigi la epikan trumpeton k la sonan klarionon?

Mola k la germanoj pensis pri Bilbao. Ni malhavis en Nordo aeroplanhavenojn. Ili havis multajn. K ili akiris de Germanio k Italio multajn aeroplanojn, grandnombre trimotorajn. K ili albordigis en Portugalio k Galicio k laste en Pasajes—oh mirakloj de la "Neinterveno"—dekduojn da baterioj. La tuta materialo surtera k aera estis funkciigita. La supereco estis alprema. Tamen ili ne konfidis al ĝi k alkuris al teroro. Estis detruitaj vilaĝoj k urboj. Ĉiutage 80-100-120 aeroplanoj flugis super la malfeliĉa Baskio, forĵetante perverseme siajn bombojn k superverŝante ĝiajn stratojn k vojojn per siaj mitraliloj. K la humaneco ektremis pro teruro...

Venka glavo de lia moŝto imperiest-a!... La faŝista Hispanio ne esta alia ol trista karikaturaĵo de Hitler k Musolini. Ĝi perdis sian kategorian moralon. Ĝin posedas fremdlandaj armeoj. Generaloj kun ekzotikaj nomoj donas ordonojn al siaj militistoj-subuloj. "Oni venkis en Baskio dank al la italaj nigraj plumoj, diras fanfarone la roma gazetaraĉo". K la germana siavice prikantas la glorojn de la germanaj aviadodo k artilerio, detruantoj de bilbaa ferzono...

150 miloj da baskaj loĝantoj forlasis siajn fajrerojn por ne suferi la jugon de la invadantoj. Antaŭ ol vidi profanita sian gloran urbon de la italoj, germanoj, maŭroj, apaĉoj de la tercio, reketistoj, falangistoj. Ili preferis emigri al la montaro de Santander k Asturio. Tutaj kvartaloj restis senhomaj. K en ili nur la malgaja ululado de la malsataj hundoj-vagabondoj akceptis la paradan defilon de la ebriaj dungitoj...

# La rekta agado de la universala proletaro

La eŭropaj demokratioj ne modifas sian pozicion rilate la hispanian problemon. Nek ili modifos ĝin. Depost la forpreno de Malago, la krimo en Almerio k la falo de Bilbao nenio estas atendebla de la t. n. demokratioj. Ili sekvas dialogi kun niaj hodiaŭaj murdistoj, kiuj estos iliaj morgaŭaj.

Ni atendas ĉion de la universala proletaro. Ĝi unike povas savi la hispanan revolucion k sin mem, aplikante la rektan agadon. K jam komenciĝis tia movado. Tra la tuta amerika kontinento oni jam propagandas por Hispana Milico de Ameriko k Internacia Brigado de Ameriko.

Ni reproduktu la tekston de la manifesto, kiun la hispana-amerikaj proletoj diskonigis por komenci periodon de rekta agado en la batalo kontraŭ la faŝismo.

La manifesto diras:

La hispanoj, la hispano-amerikanoj k la urbanoj el aliaj landoj, kiuj apogas la Hispanan Respublikon, loĝantaj en Ameriko, nombriĝas miloj. Ĉiuj ili devas konsideri konstante, ke la invadadmilito en Hispanio flanke de Italio k Germanio devos esti gajnita en la ariergardo k en la fremdlando pli ol en la batalfrontoj mem.

Germanio estis venkita en la mondmilito ne milite, sed dank al la potenca armilaro, kiun uzis la kontraŭloj—la nigraj listoj k la ekonomia blokado.

Do la hispanaj milicanoj k la Internacia Brigado de Ameriko venkos la internacian faŝismon, uzante la samajn sistemojn, t. e. bojkotante ekonomie la produktaĵojn de la menciitaj landoj k de la ribelula teritorio. Ĉiu centavo, kiun oni ne donos por komercaĵoj al la menciitaj landoj, multigote milionoble de la Hispana Milico de Ameriko k Internacia Brigado de Ameriko, estos morala frapo por internacia faŝismo k kontribuos al la venko de la Hispana Respubliko.

Pro tio estas necese sekvi la jenajn instrukciojn kun pleja fervoro k plej perfekta disciplino:

1. REKTA AGADO Ne aĉeti komercaĵojn k produktaĵojn, germanajn k tiujn de la ribelula teritorio. Ne uzi la kablaron k la vaporŝipojn de la menciitaj landoj. Ne frekventi la kunvenejojn de italoj, germanoj k personoj de kiu ajn nacieco, kiuj ne estas deklaritaj kiel antifaŝistoj ktp.

2. MALREKTA AGADO Fari alpremo super komercistoj ĉiuloke, por ke ili detenu sin plenumi petojn de germanoj, italoj k tiuj de la ribelula teritorio, deklarante bojkoton en okazo, ke ne priatentas la indikojn. Bojkoti la komercistojn, kiuj anoncas en faŝ istaj gazetoj ktp.

3. PROPAGANDADO Reprodukti ĉi tekston, presigi ĝin en la gazetojn, legi ĝin en la mitingoj, influi konstante al la parencoj, amikoj k konatoj, por ke ili eniru en Hispana Milico de Ameriko aŭ en Internacia Brigado de Ameriko, t. e. por ke kunlaboradu al la herooj, kiuj batalas en Hispanio k kiuj suferas en Hispanio, atingante venkon en la ariergardo pere de la Nigraj Listoj k Ekonomia Blokado super la faŝistaj landoj.

# Ĉiulandaj laboristoj helpu tuj

Ni konstatas la doloran fakton: dum la faŝistaj registaroj jam intervenis k plue intervenadas senhonte kontraŭ la hispana proleta popolo, dum la "demokratiecaj" ŝtatoj sankcias pro sia kunkulpeco tiun krimon,la ĉiulandaj laboristoj, kiuj devas pleje alkuri al helpo, ne agas decide k efike, kiel la cirkonstancoj postulas.

Jes, ni scias, ke en pluraj landoj la pezego de la diktatoreco bruta malpermesas al ili grandskalan agadon. Ni scias ankaŭ, ke multaj proletaj medioj entreprenas la eblan por kunhelpi nian batalon. Sed estas same certe, ke grandaj organizaĵoj, kiuj disponas forton k liberon pri sia movado, ne provis helpi la hispanan proletan popolon, kiu estas ekstremata de la buĉistoj de la internacia kapitalismo. Ja ne estas helpo elbuŝigi deklarojn, prononci diskursojn, aŭ kolekti ioman monsumon. Estas necesa io plia ol ĉi-ĉio, io kongruanta al la egaj oferoj, kiujn fordonas la ibera proletaro. Estas bezona intensa agado, kiu embarasu la registaraĉojn k forlasigu sian kunkulpecan ludon pajacan. Praktika entreprenado k efektiva solidaro. K plie kiel agitado, kiel propagando, kiuj kontraŭagadu la senhonoron-montratan de niaj malamikoj, ni rajtis atendi de la internacia proletaro multe pli ol ĝi faris.

En momentoj, dum kiuj urĝegas agadi rapidege k decidege, oni ankoraŭ inter-diskutadas, sondadas k marĉandadas internacie pri la solidaro demonstrenda al la hispana proletaro. Jen estas la tragedio de la hispana proletaro k la tragedio de la internacia proletaro. Oni dirus, ke la viruso, la putriĝo de la demokratio infektis ankaŭ la laboristojn k viktimigis ilin al la sama sistemo de prokrastoj k interdisputoj—la parlamentado.

Tamen ni, la hispanaj proletoj, ankoraŭ atendas, ke la internacia proletaro estos kontraŭagonta. La malamiko, kiu senfekundigas niajn kampojn k murdas niajn pli bonajn homojn, estas la malamiko al la libero, al la bonstato de ĉiuj proletaj popoloj. Ties triumfo en Hispanio estus samtempe la premado de la ĉiulandaj movadoj antaŭenemulaj. Pro tio ne nur memdeviĝo pro solidaro, sed ankaŭ pro legitima defendo postulas de ĉiulandaj laboristoj alkuri rapidege k efikege al nia helpado.

Ni frate atendas, petas tiun rapidegan, senprokrastan helpon. Sen kondiĉoj, sen marĉandoj, sen demandoj pri partio aŭ doktrino. Antaŭ k super ĉio estas la neceso k la devo savi popolon, savi elementajn principojn de civilizo k kulturo.

Ĉiulandaj laboristoj, ni atendas ĉiuminute vian helpon! Ŝtatistaĉoj k la reĝantoĉoj de la putra demokratio demonstris siajn subtenon k kunkulpecon al la faŝistoj, al la buĉistoj, al la internaciaj apaĉoj. Ja korvo al korvo okulon ne pikas. Ĉu tion vi, fratoj, ankoraŭ ne ekkomprenis?

Nur via solidariĝo firma k fruktoporta povas savi la hispanajn proletojn, viajn fratojn, viajn samklasanojn. Nur la solidariĝo de la ĉiulandaj laboristoj senventrigos la faŝismon.

Ĉiulandaj laboristoj, ni atendas ĉiuminute vian helpon.

---

**POPOLHEROOJ**

# FRANCISCO ASKASO

Unu el la herooj de la hispana revolucio k kontraŭfaŝista batalo, eble la plej adorata de la hispana popolo, estas Francisco Askaso.

Kial la popoloamis Francisco Askaso? Ĝi amis lin pro lia humileco k pro lia boneco. Francisco Askaso estis homo sincera k malavara. Kiuj kredis, ke la anarkistoj estas speco de kruelaj lupoj, de ŝakaloj, ŝanĝis sian opinion, ekkoninte la fruepereintan heroon.



Fr. Askaso estas naskita en Aragono. Lia patro mortis tre juna. Tre juna k tre malriĉa. Kiel mortas ĉiuj noble batolantaj por la panpeco de siaj filoj k por la triumfo de siaj idealoj. K mortante li lasis sen vivrimedoj sian ekzinon Emilia k siajn gefilojn, Domingo, Aleksandro, Francisko k Maria. Do la zorgitoj restis forlasitaj. Almudevar, lulilo de la familio de Askaso, situata en la provinco Huesko, kie naskiĝis Francisco en 1901, ĉesis esti amata loko por ili. Baldaŭ ili ekkonis la brutalan indeferenton de la homoj. Kion fari? ripetadis la malkonsolata patrino antaŭ la tragedio de sia ruinigita hejmo. K ili decidis translokigi sin al Saragoso, kie naskiĝis por ili nova vivo, nesenofera, sed multe pli homa.

Fr. Askaso komencis labori en "CAFE ROYALTI". Por 30 pesetoj monate laboradis horojn k horojn... Li lavadis telerojn k glasojn. Akompanadis la mastrinon al la vendejo. Iradis por ĉiuklasaj alportotaĵoj. Purigadis botelojn en la drinkejo k toleradis riproĉojn. Kvar jarojn Askaso suferis la stultan taskon iradi aĉetadi, lavadi glasojn k esti konstante je dispono al la unua idioto, kiu eniras en "CAFE ROYALTI", nepovante eviti la devigon priatenti lin k toleri liajn impertinentojn. Sed unu tagon la pacienco de Francisco elĉerpiĝis k li decidis enpaŝi la panejon de sia onklo por daŭrigi sian panistlernadon, kiun li komencis en Almudevar en la panejo de sia patro. La supermezura laboro k la eta rekompenco, la ekspluatado, kiun kiel li suferis ankaŭ miloj k miloj da knaboj en la aragona ĉefurbo, vekigis lian sentemon k komencis formiĝi lia revolucia spirito.

Multajn fojojn li diskutadis kun siaj fratoj, kiuj jam estis en la sindikataj vicoj de C. N. T., super la interkonsento uzi tiajn k aliajn procedojn por atingi la emancipiĝon de

la laboristoj, eksplotataj senhonte de la labordonantoj.

Kiel 15 jarulo li partoprenis aktive panistan strikon, frontante entuziasme ĉiuspecajn defendojn de la burĝaro. Sed sekvis la triumfo de la patronoj k Askaso estis detenita k ĵetita en karcelon, en kiu suferis 15 tagojn. Pro tio, ke la striko malsukcesis, li perdis la eblon reveni labori en Saragoso, tial ke estis kvalifikita kiel danĝera anarkisto.

Ofendite pro tia maljusta enkarceligo, li donis sin komplete al ĉiuflanka agado sociala k revolucia. Ĉe li vekiĝis la studemo. Li legis multajn librojn. Studis diversajn problemojn, kiuj agitas la proletaron k kun admirinda abnegacio atingis intelektan kapablon, nekutiman por liaj aĝo k klaso. La saragosaj laboristoj ne malfruiĝis taksi la intelektan avantaĝon de la eta panisto. La burĝoj interkonsentis ne doni al li laboron. La polico spionis ĉiujn liajn movojn.

En 1920 kun motivo de ribeliĝo en la soldatejo de Karmen en Saragoso, movado estigita de Chueca k aliaj kamaradoj, kiuj sieĝis la soldatejon, mortigis la serĝenton k la oficiron, la aŭtaritatuloj profitis la okazon por persekuti la pli agemajn elementojn de C. N. T. Sufokite la ribelo, unu kanajlo denuncis la soldatojn-partoprenintojn k 7 estis mortpafitaj. Depost kelkaj tagoj la denuncinto estis dispecigita kugle apude de sia domo. Kiu mortigis la denuncinton? La polico ankoraŭ ignoras pri tio. Ĉiuokaze pri la morto de la denuncinto estis akuzita Fr. Askaso. K se la Saragosa proletaro ne estus deklarinta generalan strikon, Fr. Askaso, malgraŭ sia senkulpeco, mortus sur la eŝafodo.

Liberigita depost 2 jaroj el la karcelo, kie lia karno estis barbarece ĉifita kiel en la tempoj de la Inkvizicio, liforlasis Saragoson, translokiĝante al Barcelono.

Dum malmultaj tagoj depost sia alveno en Barcelono, li sukcesis dungi sin kiel hotelbubo, ne malfruiĝante partopreni la sindikatajn batalojn, kiuj tiam sangigis la stratojn de la urbego, kamaradante kun Durruti, Garcia Oliver, A. Fernández, L. Callejas, T. Escartín, Monserrat k aliaj rimarkindaj membroj de C. N. T. k anarkistaj grupoj.

Askaso restadis en Barcelono 6 monatojn, travivante ĉiuspecajn danĝerojn. Poste li iris al Korunja kun intenco translokiĝi al Ameriko, sed ne povis realigi sian projekton, ĉar la polico metis sur lin manon k puŝis lin en karcelon, akuzate ke estas alveninta al Galicio kun aspiro mortigi Martinez Anido, krimeca generalaĉo. K de Korunja liberigite li revenis al Saragoso. Alvenante al la aragona ĉefurbo, Fr. Askaso troviĝis en nova malagrablaĵo. La "Liberaj sindikatoj", fonditaj en Barcelono de Arlegi k Martinez Anido, agadis sange laŭ la ordonoj de la degenerita kardinalo Soldevila. K malgraŭ ke la diboĉema kardinalo disponis legionon da murdistoj salajrataj, ĉiuspecajn subtenojn de la ŝtato k de la eklezio k de ĉiuj juĝorganismoj, unu tagon ĝuste kiam estis eliranta el sia luksa restadejo en la ĉirkaŭaĵo, kie onidire li amuziĝadis kun la plej belaj "filinoj de Maria", la kardinalo estis mortpunita senskandale, kun plej granda konveneco... Ununura pafo sufiĉis, por ke la voluptema kardinalo likvidu ĉiujn siajn krimojn.

Al kiu oni imputis la morton de Soldevila? Al Fr. Askaso k nia heroo estis detenita k enkarceligita kune kun aliaj kamaradoj. Sed venis 8 de decembro 1923, 6 monatojn depost lia deteno, k per ununura frapo li saldis ĉiujn siajn ŝuldojn. Kiel? Li fuĝis el la karcero, trompis la policon k poste transpasis la francan landlimon. K en Francio dediĉis sian vivon al studado k laboro, ĝis povis foriri al Ameriko por prediki siajn liberigajn ideojn al la Nova Kontinento.

En junio 1925 Askaso revenis al Francio, kunvenante en Parizo kun Liberto Kalejas, Buenaventura Durruti, Garcia Oliver, Jover, Fernandes k aliaj kamaradoj-refuĝintoj, decidante fondi "Liberion", anarkista gazeto eldonita hispanlingve, kiu kontribuadis tre efike pri la enabismigo de la diktatoreco de Primo de Rivera.

Ankaŭ en Parizo Fr. Askaso estis persekutita en kelkaj okazoj, suferante malliberejajn torturojn. Fine decidis translokiĝi al Belgio k poste al Germanio, de kie revenis al Belgio, fiksante sian restadejon en Bruselo, en kiu vivis feliĉe kun sia amata Berta, ĝis la tago de la proklamo de la hispana Respubliko.

Reveni al Hispanio estis granda kontentiĝo por nia heroo. Sed li ne prokrastis konsideri, ke estis necese daŭrigi la batalon por la libero, ĉar la Respubliko estis regata de la reakcia militistaro, de la Bankaro k de la Eklezio. K li bataladis kun plejaj flamo k entuziasmo, kiel neniam, en la sindikatoj, en la Komitatoj, en la fabrikejoj k en la uzinoj, en la kolonoj de la tuta gazetaro konfederacia k anarkista. Li laboris diligente en la barcelona sekretariejo ĉe la Regiona Komitato de C. N. T. Kelkfoje persekutite k ekzilite aŭ enkarceligite, li unua alkuris, kiam venis 19 de Julio, al la elmetitaj je granda danĝero kamaradoj. Li batalis energie bravege... Li alfrontis ĉiujn malamikojn ĝis kiam la mortvomanta faŭko de la kanono, kiu defendis Atarazanas, senĉese pafante, k kies mitralilo finigis lian vivon, dispecigante lian korpon.

Estas sendube, ke tiujn tagojn, ĝuste la 20 de Julio 1936 la hispana proletaro perdis unu el siaj plej bonaj apostoloj.

Fr. Askaso predikadis ĉiam ekzemple.

# Filoj de la popolo

anarkista himno

Filoj de l'popolo, vin su bpremas katenoj,
k ĉi maljusto ne sekvu plu,
se via ekzisto estas mondo da penoj,
antaŭ kiuj sklav' morton preferas nun.
En la batalo la hieno faŝista
pereos de nia granita fort,
k la tuta popolo kun la anarkistoj
triumfigos la liberon tra la mond.
Laboristar, ne pli da ve;
la premantar indas je pere;
Levigu vin, popolo vi,
ĉe l'krio de l'socia revoluci.
Forta unuec de fid k agad
la revolucion estigos ja.
K nia standard' estu unu nur
sole en la unuec estas la venkotriumf.

Tr. O

# Kroniko

La jurnalisto Joan Louguet publikigis en Pariza gazeto artikolon kun titoloj "Krucumita Hispanio", "La sovaĝaj kruelĉeoj de Franko en Bilbao", el kiu ni eltiras la sekvantajn fragmentojn:

"En Sestao multaj laboristoj estis mortpafitaj sen juĝo. Aliaj estis morpafitaj sur la stratoj, kiam estis forlasantaj la urbon."

"Nur de unu strato 10 laboristaj familioj estis barbarece murditaj. Entute la numero de la murditoj en Sestao atingas 150."

"Portugalete centoj da soldatoj k popolanoj estis mortpafitaj sen era juĝa kondiĉo".

"En Arboleda la faŝistoj pafadis al unu ejo, en kiu estis rifuĝintaj multnombraj personoj ne batalantoj, plejparte virinoj k infanoj. Cento da ili pereis bruligitaj vivaj".

"En Ortuela unu junulino, pro tio ke ne volis konsenti la kapricojn de unu maŭro estis dispecigita de li perponarde."

* * *

De la 5 ĝis la 12 de Julio okazis sinsekve en Valencio, Madrido k Barcelono la dua Internacia kongreso de la Antifaŝistaj Verkistoj pri Defendo de la Kulturo. La kongreson partoprenis kelkdekoj da diverslandaj verkistoj inter ili: Marlaux, Benda, Champsom (Francio), Ludwig Renn, Sten. (Germanio), A. Tolstoj, I. Ehremburg (Sovetio), M. A. Nexo (Danio), Pablo Neruda (Ĉinio), Nicolo Potenza (Italio), Evakn (Ĉehoslovakio), Marinello (Cuba), Cortecao (Portugalio), Pellicer, Blanka Sidio Trejo, Manisidor (Meksikio), L. Stojanov, Grubeŝlieva (Bulgario).

Nicolo Potanza interalie rimarkigante, ke vera Italio ne estas tiu de Musolini, sed ke la itala popolo subtenas la hispanan popolon, diris: La italoj ne povis fari ĉion kion volis por helpi al la hispana popolo. Sed en la Iberiaj tranĉeoj k en Italio mem ili batalas entuziasme.

Kolonelo Redondo renkontante en Madrido la kongresanojn k reprezentante generalon Miaja, diris interalie: "Niaj malamikoj batalas sub la flago de la civilizacio k de la kapitalismo. K por atingi tion ili venigas al si italojn, germanojn, irlandanojn, maŭrojn, ktp. Ĉu per tiu-ĉi miksaĵo ili volas konkeri Hispanio por civilizi ĝin? Civilizi Hispanion? Hispanio estis la patrino de la civilizacio k ne bezonas ilin por konservi ĝin! "K poste: "Ni bezonas helpon pli efikpovan, estas necese, ke ĉiuj antifaŝistoj en la tutmondo grupiĝu por doni bataladon al la internacia faŝismo, kiu aspiras nin piedpremi. K mi volas, ke vi ĉiuj, reveturinte viajn landojn, estu heroldoj pri la tragedio."

* * *

La 5, 6 k 7 de Julio okazis en Valencio kunsido de la Plenum-Komitato de la Regionaj Komitatoj ĉe F. A. I. La ĉeestintaj delegitaroj reprezentis entute 158, 680 anojn, malestante la reprezentantoj de Asturio k Nordo. Dum la kunsido interalie pritraktiĝis la problemo pri la nova orkanika strukturo, kiu estas donenda al F. A. I., transformante la organizon en grupojn k aliigante ĝin laŭ grupiĝoj publikaj, lokalaj, distriktaj k regionaj.

* * *

Nia kamarado Gonzalo de Reparaz, pri kies aresto ni raportis en la veninta numero, jam estas liberigita.

# LETERUJO

K-DINO. DAFII FUNLAY—LONDONO. Ni ricevis la ŝterlingan funkton pro kio ni dankas vin, sed bedaŭrinde ni ne plu povos ŝangi al vi la resp. kup., ĉar ekde nun pro novleĝaj aferoj la ŝanĝo ne utilus nin.

K-DO. JUAN SABATÈ.—BUENOS AIRES. La du pesoj de vi senditaj estas jam en nia kaseto. La antaŭan pakaĵon kaj leteron kun resp. kup., ni ankaŭ ricevis, se ni ne menciis ilin en I. B. estis pro nevola forgeso. La lastan pakaĵon, kiun vi sendis ni ankoraŭ ne ricevis. Ni elkore dankas vin pro la monhelpo kaj pro viaj sinsekvaj tradukoj. Antaŭen kamarado!

M. W. WOUT.—AMSTERDAM. La prezo ne ŝanĝiĝis k-do. Post la numero kiujn vi menciis sekvas jam la presita dekkvintaga I. B.

K-DO. JUAN BOCH.—VALENCIO. Ni dankas vin pro la senditaj poŝtmarkoj. La adreso de I. L. E. S. Grupo estas Juventudes Libertarias Valencio.

K-DO. N. ALEKSANDROV.—N. PETERHOF. Dankon pro la libretoj kaj letero, kiun ni bone ricevis. La libretoj estos kompreneble senditaj la la ĉebatalfrontaj kamaradoj.

K-DO. G. WOLMER.—TUNGESTA. Elkoran dankon pro la senditaj 5. 2 ŝilingoj, kiujn ni bone ricevis.

J. FIGUERAS.—SALT. Via letero ricevita.

K-DO. DUPLAU.—ALGER. Jes, k-do, ni ricevis la kolekton de "British Esperantist". Dankon. Jes, ni bone akceptos la francajn gaz. Momente la Bulteno estos dusemajna. Ni dankas vin pro respondkuponoj.

K-DO. NORE JANSSON.—OREBRO. Jes, k-do vi pravas la faŝistoj uzas ĉiujn firimedojn por montri nin al la mondo kiel sovaĝuloj, sed feliĉe la tuta mondo jam konas cinikecon de tiuj kanajloj.

K-DO. R. J. H.—HAGO. Ni sendas la materialon. Unu el la du gazetoj, kiujn vi mendis ne plu aperas, ĉar ĝi estis malpermesita.

K-DO. HORACE WALKER.—LEEDS. Ni dankas vin pro la ĵurnaleltranĉajoj k resp. kup.

K-DINO. TERESA FERRER.—ALCOVER. Al "Laboristo" ni ne povas vin aboni, ĉar ĝi ne plu aperas. Anstataŭ ĝi vi ricevos "Informan Bultenon".

K-DO. T. C. KIJN.—AMSTERDAM. Ni tre dankas vin pro via ofero. K-do Bout ne respondis ankoraŭ al nia propono pri poŝtkonto, se li ne respondas en kelkaj tagoj ni akceptos vian oferton kaj publikigos **vian nomon k adreson sur la** venonta Informa Bulteno.

K-DO. AXEL BOMGREM.—UPPLANDSBODARNA. Dankon pro la senditaj kuponoj.

K-DINO. WILLY GARDIEN.—ROTTERDAM. Elkoran dankon pro la gaz. "Wij".

K-DO. FOLKE ROSEN.—STOCKHOLM. Ni sendas pakaĵon da Informa Bulteno al via adreso en Rotterdam pere de k-do. C. van Essen, de la kaj 2a numeroj.

Koncerne vian prititolan proponon ni lasas la saman.

K-DO. H. N.—BELGIO. Kamarado, vian aferon ni jam prizorgas, sed ni ne povas sciigi ion al vi ĝis la proksima numero.

K-DO. J. Garganta sciigas al siaj diversaj gekorespondantoj, ke li estas provizore devigata ĉesigi la korespondadon pro malsaniĝo.

**Presejo "DELTA" - Str. Kortes, 312 - Barcelono**